

Pri la naskiĝo de Kultura Centro Esperantista
Radioprelego de Claude GACOND, SRI 462, 1981.03.12 & 14

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia Claude Gacond kun Andy Künzli, la plej juna esperantisto de Svislando, kiu transprenis esperanto-funkcion. Li estas redaktoro de la organo LA LUCERNA PROGRESO.

La pasintan semajnon, babilante kun nia juna samideano, mi iel devigis lin rakonti pri liaj ŝatokupoj kaj vivceloj. Deknaŭjara, Andy Künzli nuntempe frekventas gimnazion en Lucerno, kaj li ĝuste ricevis gimnazian taskon realigi intervjuon. Li informiĝis perletere, ĉu mi akceptus min submeti al liaj demandoj. Nur jese mi povis respondi, al lia afabla propono. Kaj ĉar tutcerte tiu ĉi babilado ne nur interesos lucernajn gimnazianojn, sed tre verŝajne ankaŭ vin, karaj radio-aŭskultantoj, mi proponis al Andy Künzli, ke tiu ĉi ekzerco okazu antaŭ la radio-mikrofonoj. Andy Künzli, al vi apartenas la gvidado de la ludo;

A.- Sinjoro Claude Gacond, vi estas ĉefa gvidanto de internacia instituto, vi laboras por Esperanto, vi estas direktoro de Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds. Kio fakte estas tiu ĉi Centro, kia vivo regas tie, kio estas via laboro?

Cl.- Jen multaj demandoj. Kultura Centro Esperantista estas institucio sufiĉe kompleksa. Ĝi estas oficejo, kie centriĝas servoj poresperantaj: kiel ekzemple kursoj perkorespondaj, libro-rservo, aranĝoj, studaj semajnfinoj, feriaj kursoj, seminarioj metodologiaj por pedagogoj, eldono de Studoj, organizo de rebat-servo al neobjektivaj artikoloj pri Esperanto kaj sistema rikoltado de ĉiuj artikoloj pri esperanto kaj interlingvistiko kaj statistikado de tiuj dokumentoj. Por la studentoj estas kreata gastejo, kiu jam posedas du domojn. Por konservi pli kaj pli abundan dokumentaron stariĝis en la urba biblioteko Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI), kiu mondfamiĝis pro sia labor-objektiveco. Fine, sub la nomo "Esperanto Lernejo" tiu ĉi Centro posedas komisionon, kiu provas instigi la instrumediojn en Svislando ekkonscii pri la servoj, kiujn Esperanto povus alporti profite al la instruado de la gepatra kaj fremdaj lingvoj kaj profite al pli profundaj rilatoj inter la svisoj, kiujn dividas kvarlingveco. Jen multaj kaj kompleksaj respondecoj, ĉu ne?

A.- Jes! Kaj se mi ne eraras, via instituto Kultura Centro Esperantista estis fondita en 1968. Kiel kaj kial oni venis al tiu ideo fondi kulturen centron por Esperanto.

Cl.- Tiu ĉi Centro estas fakte la rezulto de analizo, kiun ni faris kun Edmond Privat kelkajn monatojn antaŭ lia morto. Estis en 1960 aŭ 1961. Okaze de kunveneto, kiu grupigis edukistojn, Edmond Privat provis kritike analizi sian poresperantan aktivecon. Li tiam konsilis al ni konsideri la esperanto-movadon kiel subevoluintan socion, kiu bezonas helpon tre similan al tiu, kiun oni alportas en Afriko aŭ Azio sub la aŭspicio de Unesko kaj help-organizaĵoj. Kaj li konsilis, antaŭ ĉio dediĉi niajn fortojn al la starigo de dokumentejo, kie la studentoj povos ekstudi la historion de Esperanto kaj interlingvistiko, kaj kulturen centron, kiu celu renkontigi la esperantistaron, kiu ĝenerale estas ne tre klera, kun la elito de nia movado.

A.- Tiu ĉi analizo okazis en 1960, vi diris, sed Kultura Centro Esperantista kreiĝis nur ok jarojn poste.

Cl.- Jes, post la morto de Edmond Privat, okazinta en 1962, en la kadro de la asocio de la Esperanto-edukistaro de Svislando, oni antaŭeniris en tiu ĉi analizo, pretigante labor-planon.

Mi mem, kiu plenumis la funkcion de sekretario de tiu asocio, sentiĝis pli kaj pli koncernata de tiu ĉi plano. Kaj estas fakte pere de mia laboro por nia Svisa Radio Internacia, ke mi kaj mia edzino, ni konvinkiĝis, ke la tempo estas matura, por ekrealigi tiun ĉi programon.

A.- Kio fakte estis tiu okazaĵo ligita al via laboro por la radio?

Cl.- Okazis en Interlaken Internacia Kongreso de Juristoj, kies diskuttemo estis la transformoj, kiujn oni devus alporti al la statuto de Unuiĝinta Naciaro, por ke ĝi fariĝu vera mondfederacia unuiĝo. Pensante, ke tiu ĉi temo povus interesi niajn radio-geaŭdantojn, mi kaj mia edzino, ni iris al Interlaken por realigi intervjuojn. Ni ne nur estis tre afable ricevataj de la kongres-akceptejoj, kiu tuj donis al ni enirpermeson kaj kongresinsignon kun niaj nomoj kaj la indiko: « Radio Svislando, kurtonda servo, esperanto-elsendoj ». Tiu vorto Esperanto tuj altiris la atenton de la kongresanoj, kaj tiuj, kiuj scipovis la lingvon, venis nin saluti. Rapide montriĝis, ke ili reprezentis pli ol dekprocentojn de la kongresanoj. Ili formis specon de delegacio grupiganta dudekon da homoj el ĉiuj kontinentoj en kongreso grupiganta 140 delegitojn. En la sepdelegita delegacio veninta el Usono, troviĝis fakte kvar esperantisto; kiuj reciproke nesciis, ke la aliaj scipovis Esperanton. Ni havis tre interesajn kontaktojn kaj decidis, ke la momento serioze labori por Esperanto estis veninta.

A.- Kaj kion vi faris tiam por povi serioze labori por Esperanto?

Cl.- Mi ŝparis monon, por povi sensalajre min dediĉi komplete al la plenumado de la antaŭvidita labor-plano. Mi ricevis unu jaron de feriado sensalajra. Fondiĝis Kultura Centro Esperantista kun tre preciza statuto, kaj esperantistoj malavare subtenis la tutan agadon, sed iliaj donacoj neniam sufiĉis, bedaŭrinde, por kovri la elspezojn, kiujn la plenumado de la labor-plano trudis.

A.- Vi do ne povis esti salajrata?

Cl.- Jes, montriĝis, ke la Centro ne povos salajri sian sekretario. Tial, post tri jaroj, kiam mia monrezervo estis elĉerpita, mi povis akiri duontempan instrupostenon en la urbo La Chaux-de-Fonds, kiu, per tiu apogo, iel subvenciis mian poresperantan laboron. Tiu ĉi eksperimento duope gvidi la instruadon ĉe elementa klaso tiel bone sukcesis, ke la Ŝtato decidis oficialigi tiun instrueblecon per leĝdekreto, kaj nun en mia kantono pli ol dudek klasoj en la elementaj lernejoj estas gvidataj de du duontempaj instruistoj, kiuj tre intime kunlaboras.

A.- Neatendite laboro poresperanta havis influon en tute alia fako.

Cl.- Jes, kaj tiu ĉi sukceso poste multe helpis min en mia poresperanta laboro. Sed mi devis provi servi du malsimilajn majstrojn sen ke unu el ili suferu neglektemon profite al la alia. Mia devizo fariĝis, ke al ambaŭ mi dunu iomete pli ol la antaŭvidita duono. Kaj ricevante almenaŭ regulan duonan salajron, mi povis sensalajre daurigi duontempe mian laboron por Kultura Centro Esperantista. Kaj en deko da jaroj, ĝi fariĝis tio, kiun mi provis klarigi responde al via unua demando.

A.- Se vi devus konsili esperantiston, kiu volus vin imiti, kion vi dirus al li?

C1.- Mia konsilo estus: persisti en sia strebado. Nur tiel oni alvenas al videbla sukceso. Kaj persisti malgraŭ la malfacilaĵoj, kiuj estas ĉiam multe pli grandaj ol antaŭvidite, eĉ en la plej detala labor-plano.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Andy Künzli parolis kun Claude Gacond pri la naskiĝo de Kultura Centro Esperantista.

Cl.- Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*